Flandra ★ ESPERANTISTO

TIJDSCHRIFT VOOR ESPERANTO-ONDERWIJS EN -PROPAGANDA

Verschijnt maandelijks
Twintigste jaargang
Nummer 4 (225)
APRIL 1953

Vertegenwoordiger in Nederland:
LEEN
sekr. Stadionkade 6, *Amsterdam Z.*
postrek. 34563 van P. M. Mabesoone
Pythagorasstr. 122, *Amsterdam O.*

Orgaan van de
VLAAMSE ESPERANTISTENBOND
POSTBUS 100, MECHELEN
Postrekening 2321.50 van V. E. B.
J. Terrijn, Raapstr. 74, Gent

LIDGELDEN:
* Leden: 100 fr.
* Steunleden: min. 150 fr.
Inwonende leden: 25 fr.
(* met bondsorgaan

ABONNEMENTEN:
België: 75 fr.
Ceteraj landoj: 75 bfr.
Proefn.: 5 fr. (1 r.k.)

ANTVERPENO KAJ SKELDO

Historiaj faktoj (Daŭrigo)

„Antverpeno", diras ĝia historiisto D-ro Floris Prims, „ĝuis tra la jarcentoj trifoje ĝeneralan sed precipe ekonomian disvolvon, ĉiufoje favorege konstrastantan kun la antaŭa periodo: en la 13-a 14a jarcentoj, en la 16a kaj en la 19a jarcentoj. En ĉiuj ĉi periodoj la urbo „renoviĝis" kaj ege disvastiĝis. La Flandra literaturo floris en la 14a jarcento, la latina kaj flandra en la 16a-17a jarcentoj kaj denove la flandra en la 19a jarcento.

„Pri la arto en la 13a-14a jarcentoj ni tre malmulte scias, sed ekde la 15a ĝis la 17a jarcentoj ĉiuj artoj alterniĝis apogeante en la Rubens-skolo."

Kaj la bato de tiu pulsanta vivo de Antverpeno, la „kosmopolita kaj provinca urbo, kiu fiksiĝis ĉe unu el la plej majstraj kurbiĝoj de Skeldo," tiu bato sentiĝas ĉe la riverego mem, kies sorto decidis pri la sorto de la urbo, tra ĝia tuta historio glora kaj ofte tragedia. Ĉiu progreso aŭ stagno en la ekonomia funkcio de la haveno, sekve ĉiu abundo aŭ mizero en la urbo, estis ĉiam la konsekvenco de militoj, ribeloj, kvereloj aŭ arbitraj aranĝoj. Sed ĉiam Antverpeno, kiu krome transvivis du mondmilitojn, pruvis admirindan vivopovon, neelĉerpeblan energion kaj laboremon tra ĉiuj travivaĵoj, kio esperigas la plej bonan almenaŭ en paca estonteco.

ANTVERPENAJ VIDINDAĴOJ

KATEDRALO. - (Groenplaats)

La Sankta Virgulina preĝejo estis konstruata de 1352 ĝis 1543. Sendube unu el la plej majestaj gotikaj preĝejoj. Ĝi estas longa 117 m. kaj larĝa de 62 ĝis 75 m. La arkaĵoj ripozas sur 125 kolonoj. La puntumita turo, alta 123 m. enhavas rimarkindan sonorilaron (1655). La plej peza sonorilo, nomita Carolus, laŭ sia bapto patro Karlo V, pezas 8000 kg.

En 1794-1798 konsiderinda parto de ĝiaj trezoroj estis forrabataj, tamen la preĝejo enhavas ankoraŭ senkomparajn artverkojn. Oni en ĝi admiras Rubens en la pleneco de sia majstra povo (La Krucaltiĝo, La depreno de la kruco, La ĉieliro de la sankta Virgulino) kaj pluraj verkoj de aliaj famaj artistoj.

PREĜEJO SANKTA JAKOBO. - (Lange Nieuwstraat)

Konstruita de 1491 ĝis 1624. La potenca turo restis neelfinita. Gotika stilo de la tria periodo. La plej riĉa ornamita preĝejo de Antverpeno. Vera muzeo! Valoraj pentraĵoj de Rubens, Van Dijck, Jordaens, Quinten Matsijs, Otto Venius, De Vos, Franken, Cobergher, Segers, Schut, Van Baelen, Van Orley k.a. Skulptaĵoj de Erasmus kaj Artus Quellien, Van der Voort, Van Maldert k.t.p.

La patriciaj familiaj de la urbo havis en ĝi siajn kapelojn kaj tombojn. Ankaŭ Rubens havas en la preĝejo sian lastan ripozejon La ĉefa altaro estas ornamita per la „Sankta Familio" de la granda pentristo, sur kiu memportreto kaj la bildoj de liaj du edzinoj.

SANKTA PAŬLO-PREĜEJO. - (Veemarkt)

En 1294 staris sur la sama loko Dominikana monaĥejo (restaĵoj). Konstruita de 1549 ĝis 1571. Lasta antverpena preĝejo gotikstila. Turo renesanca. Pentraĵoj de Rubens, Van Dijck, De Vos, De Crayer, Teniers, Jordaens k.a. Belegaj konfesejoj kaj lignaj ornamaĵoj de Artus Quellien.

Tiu preĝejo troviĝas en la koro de tipa antverpena kvartalo. Kurioza estas kalvario en ĝardeno (1709), tri etaĝojn alta kun naturgrandaj bildoj.

PREĜEJO SANKTA KARLO-BOROMEO (H. Conscienceplein)

Konstruata por la Jezuitoj dum 1614-1621. Unu el la unuaj barokstilaj preĝejoj en la lando. La turo malgraŭ la moderaj dimensioj estas la plej bela en tiu stilo de Flandrujo kaj unu el la plej belaj el la mondo. Antaŭ la granda incendio en 1718 unu el la plej luksaj preĝejoj de tuta Belgujo. La pompa fasado portas la stampon de Rubens, kiu ornamis kun siaj lernantoj la preĝejon almenaŭ per 39 pentraĵoj, kiuj escepte tri estis neniigitaj per la fajro. La preĝejo havas superajn galeriojn (maloftaĵo). Sur la ĉefaltaro, desegnita de Rubens, pentraĵo de C. Schut, kvar bildoj de Quellien. Belaj katedro kaj konfesejoj kaj riĉa S-ta Virgulina kapelo.

PREĜEJO SANKTA ANDREO (St. Andriesstraat)

Konstruata inter 1514 kaj 1529, gotikstila, 3a periodo, la preĝejo origine estis destinita por la Aŭgustinoj, kiuj estis ekzilataj en 1522 (adeptoj de Luther).

Belega ĉefaltaro. Pentraĵoj de Seghers, De Vos, Verlat, Dujardin, E. Quellien, Francken, Van Bree. La katedro, reprezentanta „la miriga fiŝkaptado" estas artverkaĵo de Jan Van Hool kaj F. van Geel. Rimarkinda estas monumento honore de Maria Stuart kun sur kupro pentrita portreto fare de Pourbus.

PREĜEJO SANKTA AUGUSTINO (Kammenstraat)

Konstruata en renesanca stilo en 1614 de Cobergher. Ĉefaltaro starigita de P. Verbruggen sub gvido de Rubens kaj ornamita per unu el la plej ravaj verkoj de Rubens: „La mistika edziniĝo de S-ta Katarino". Rubens sin prezentas mem en la figuro de S-ta Georgo; lia unua edzino Isabella Brant estas S-ta Apolino; lia dua, Helene Fourment S-ta Agneso; s-ta Sebastinano sur la antaŭplano estas unu el la plej belaj nudaj figuroj iam pentritaj.

Krome troviĝas en la preĝejo „Ekstazo de s-ta Aŭgustino" de A. van Dijck kaj verkoj de Jordaens, C. Schut, Rombouts, J. Willems, Van Diepenbeeck, Seghers, De Craeyer. Belegaj skulptaĵoj

(daŭrigota) TYNEVERUM.

BENELUKSA ESPERANTO-KONGRESO

Antwerpen, 23-24-25 de majo 1953-a

Oficiala Komuniko nro 3

Jen la plej freŝdataj kaj kompletaj informoj pri nia granda okazaĵo pentekosta!

Nombro da aliĝintoj: pli ol 200.

Jam akceptis membrecon de nia honorkomitato: la provincestro, la Urbestro, la skabeno de Publika Instruado kaj —last but nost least— la Ĝenerala Konsulo de Nederlando, lia Moŝto Duco Middelburg, *kiu persone ĉeestos kelkajn programerojn i.a. la oficialan malfermon de la Kongreso kaj alparolos la ĉeestantojn,* en Esperanto. *Tio instigos nin ĉiujn, precipe la LEEN-anojn, multnombre aliĝi kaj ĉeesti!*

Inter la aliĝintoj, ni notu: sanon W. Solszbacher, *prezidanto de EANA (Usono) kaj Akademiano, kiu certe partoprenos; s-anon* T. Jung *(„Heroldo de Esperanto") Akademianon kaj Honoran membron de UEA; delegitòn de UEA. Partoprenos ankaŭ unu aŭ du luksemburganoj, tiel ke nia Kongreso nepre estos „beneluksa".*

En la ĉi-monata gazeto vi ree trovos aliĝilon kaj ni insiste petas, si ve ne jam faris, tuj sendi ĝin al s-ano P. Mabesoone, Pythagorasstr. 122, Amsterdam W. aŭ s-anino J. Terrijn, Raapstr. 74, Gent. Pagu ne nur la kongreskotizon, sed samtempe la aliajn aranĝojn, ĉar i.a. la malaltprezaj hoteloj ne disponas multajn ĉambrojn kaj jam pluraj mendoj estas notitaj . . .

Ne ripetante la novaĵojn, kiujn vi legos en la suba programo, ni tamen substreku ke nia poŝt-oficejo funkcios sabate kaj ke poste ni mem kolektos la poŝtaĵojn por ke ili ricevu la oficialan kongresan stampon. Atentu pri la kongresa memoriga poŝtkarto (Fr. 5.— aŭ cendoj: 40 ĉe s-ano Mabesoone aŭ T. Van Gindertaelen, Raghenoplein 9, Mechelen:) la kvanto estas vere limigita kaj tiu maloftaĵo rapide estos . . . maloftega!

La kongreslibro —ilustrita— havos almenaŭ 42 paĝojn kaj estos sendata al la aliĝintoj je la 15-a de majo venonta, tiel ke ĉiu havos la tempon zorge trastudi ĝin. Listo de la —tiutempe— aliĝintaj kongresanoj aperos en ĝi. Reklamoj estu rapide varbitaj kaj senditaj al s-anoj Mabesoone aŭ Van Gindertaelen antaŭ la 1-5-53. Jen la tarifo:

1/1 paĝo	*b.fr. 750.—*	*guld. 50.—*
1/2 paĝo	*400.—*	*25.—*
1/4 paĝo	*225.—*	*12.50*
1/8 paĝo	*125.—*	*7.50*

Ĉu ni sciigu ke la partoprenantoj ĝuos fervojan rabaton de 25 % (por Nederlandanoj: de la belga limo!): la rabatilo estos baldaŭ sendata!

Programo

Notu ke, se ejo ne estas indikita, temas pri la salonegoj „Ambassades". Anneessensstr. 20, je 500 m. de la centra stacidomo.

Sabaton, 23-5-53:

13.30 h.-Malfermo de la akceptejo, informoj kaj transdono de la kongresaj dokumentoj.

Malfermo de nia oficiala poŝtoficejo (aĉeto de poŝtmarkoj kaj de nia memoriga poŝtkarto);

Malfermo de la Libro-Ekspozicio de Belga kaj Flandra E. Institutoj.

16 h. Jarkunsidoj de B.E.I. kaj F.E.I. Gvidata promenado tra la urbo·

17 h. Laborkunsido R.B.L.E. kaj Ligestrarkunsido de Fl.L.E.

18 h. Kultura Horo.

19 h. Oficiala Malferma Kunsido de la Beneluksa Kongreso.

Fermo de la poŝtoficejo, de la Libro-Eskpozicio.

20.30 h. Granda Kongresa Balo.

Dimanĉon, 24-4-53:

8.30 h. Diservo por Katolikoj (Kapelo St. Jan Berchmans, Meir 36) kun prediko de lia Pastra Moŝto De Mayer.

(daŭrigo kol. 3)

(daŭrigo de kol. 2)

Diservo por Protestantoj (Lange Winkelstr. 5), gvidata de sro W. Koopmans (Hilversum), kun kantado de s-ino J. Koopmans-Schotanus.

9.30 h. Malfermo de la akceptejo.

10 ĝis 11.30 h. Solena Kunsido RBLE.

- Jarkunsido Fl.L.E.

- Jarkunveno LEEN.

11.30 h. Fermo de la akceptejo.

12 h. Akcepto fare de la Urbestraro en la Urbo Domo (Granda Placo)

13.— h. Oficiala Fotografado (Ŝtuparo de Flandra Operdomo —Avenuo de Francujo).

13.30 h. Komuna Tagmanĝo *(Supo, antaŭmanĝo, viando-terpomoj, deserto kaj kafo). Aparta manĝo por vegetaranoj.*

14.45 h. (Jarkunveno LEEN (daŭrigo). Promenado tra la urbo, vizito de la Domo de Rubens, muzeo Plantin ktp

18.30 h. Komuna Panmanĝo *(„Angla telero", bulkoj kaj kafo aŭ teo).*

20 h. Festvespero: teatra kaj amuza vespero (kunlaboro de la tri asocioj).

Lundon, 25-5-53:

9 h. Enŝipiĝo en „Flandria"-boato ĉe Steenkastelo kaj ekskurso tra kaj ekster la haveno (la boato estos „fermebla" ĉe malbona vetero!)

13 h. Komuna varma tagmanĝo.

14 h. Daŭrigo de la Ekskurso.

16 h. Ferma Kunsido.

17 h. Adiaŭo (17.43 h. kaj 18.45 h. forveturos el la Centra Stacidomo vagonaroj al Roosendaal, Rotterdam, Hago kaj Amsterdamo).

Ĉu Esperanto nur eventuala solvo?

Kelkafoje oni ankoraŭ renkontas en niaj rondoj la opinion ke ni unualoke kaj antaŭ ĉio defendas ne Esperanton sed la ideon forigon de ne sufiĉa interkomprenado pro lingvodiverseco. Se do alia pli bona solvo ol Esperanto por tiu problemo aperos, ni ne restos - laŭ tiu opinio - fanatikaj je nia propra lingvo, sed kun plena kontento akceptos la pli taŭgan. Fine nur la plej taŭga konkero de la interlingva problemo estus nia celo.

Ĉu tiu aserto estas ĝusta? - Ni konsideru ĝian konsekvencon. Verŝajne al pluraj ne plaĉas la penso ke ilia Esperanto reduktiĝus al afero kun nur lingvistika kaj historia valoro. Al tiaj estas abomena la imago ke la ŝatata lingvo, doninta al ili tiom da ĝojo dum multaj horoj de iliaj vivoj, devus perdi sian signifon. Sed la vojon de sentimentalaj argumentoj ni ne suriru. Pli seriozaj sin prezentas.

Povas esti ke iuj pensas: pli bona ja ne aperos, do ni povas senriske diri ke ni akceptos pli bonan. Tiuj pretervidas alian efektivan riskon. Ĉar kion eksteruloj, ne sciantaj pri la longa vojo de studeja lingvo-projekto al vere uzata lingvo, opinius pri internacia lingvo kies adeptoj dirus ke ili forlasos ĝin, se pli bona lingvo estos prezentata al ili? Tiel ni subfosus la tutan penigan klopodadon por konvinki publikon pri la akceptindo de Esperanto, por ne paroli pri la lernindo. Kial oni hodiaŭ eklernos lingvon, se morgaŭ alia venos kun la pretendo esti pli taŭga? Tiam oni do devus forgesi la hodiaŭan kaj dediĉi sin al la nova. Kaj kio postmorgaŭ? - Kiam oni estus certa ke oni nun havas la plej ĝustan?

Lingvo ne estas maŝino, kiun oni povas dismunti kaj anstataŭigi per alia pli produktiva. Ĝi ankaŭ ne estas vegetaĵo, kies trunko oni povas dehaki kaj kies radikojn oni povas elfosi kaj forigi por tiam sur la sama loko kreskigi novan pli belan vegetaĵon.

Hodiaŭ oficiale deĵuri Esperanton ne signifus ke morgaŭ ĝi estos forgesita. Lingvo vivas en la mensoj de homoj. Ankaŭ Esperanto. Ĝi jam tro longe ekzistas ke ĝi povus esti metata en la arkivojn je unu momento. Pri la multaj atingoj de la hodiaŭa Esperanto ĉiu el ni pli malpli scias. Se oni nur minuton pensas pri tio, ĉu oni do ankoraŭ kredas ke ĉi tiu lingvo povas esti nuligita?

Kaj se tamen lingvo aperas pli bona ol Esperanto; ĉu ni devus ĝin akcepti aŭ almenaŭ toleri? Ni ja ne volas esti fanatikuloj.

Ni do aliru la demandon pri pliboneco de alia lingvo. Neniu povas kun certo pretendi ke ne estas imagebla

(Legu plu p. 2, kol. 1).

lingvo pli facila ol Esperanto, sed ne kredeble estas ke tiu imagata lingvo estus *multe* pli facila. La provoj faritaj dum la lastaj jardekoj estis en kelkaj detaloj pli bonaj, sed havis ankaŭ konsiderindajn malavantaĝojn kompare al Esperanto. Kaj nun ni povas demandi: se Esperanto estas dekfoje pli facila ol naciaj lingvoj (laŭ iama konkludo de Ligo de Nacioj), ĉu oni kredas ke estus grava ke alia lingvo estus dekunufoje pli facila?

Oni kompreneble povas, se oni deziras, daŭre fari klopodojn por pli taŭgaj lingvoj, sed ĉiu nova paŝo de progreso estos malpli granda ol la antaŭa. Pli kaj pli la strebado al plifacileco tendencus perdiĝi en elpensado de subtilaj moditoj.

Ĉu por tia nur malmulte plia taŭgeco ni oferus Esperanton kaj rekomencus la tutan neimageble grandan laboron faritan en pasintaj jardekoj de multegaj konataj kaj nekonataj aktivuloj?

Sed plua pli grava faceto de la afero estas atentinda. Ni do cedus pri Esperanto favore al pli bona lingvo. Sed tiukaze estus necese, ke ni *povus scii*, ke alia lingvo estos pli bona. Kiel ni povus scii tion? Taŭgeco de lingvo ne estas ekzakte mezurebla. Kiel ni povus fari tion? Fine la praktiko decidas. Kaj tio signifas ke ni povus elekti el Esperanto kaj alia lingvo, nur se ili estus kompareblaj. Ĉu tio ne implicas ke tiu alia lingvo devas esti *vera* lingvo, t.e. ke ĝi devas esti atinginta pli malpli similan pozicion kiel Esperanto?

Nur se alia lingvo sin povus prezenti al la mondo kun la sama atingita grado de evoluo kiel Esperanto, kun simila literaturo kaj gazetaro, kun simila plurfaceta movado kaj nun konsiderindaj nombroj da uzantoj en pluraj landoj, ni povus fari plenan komparon.

Montriĝas ankaŭ, kaj ne sufiĉe ofte ni povas atentigi pri tio, ke lingvo en ĝerma stadio ne estas egalvalora kun Esperanto. „Lingvo" ekzistanta nur kiel enhavo de kelkaj ĝiaj lernolibroj kaj kiel objekto de teoriaj studoj en revuo, do „lingvo" ne praktike uzata, ne estas lingvo sed lingvo-projekto.

Lingvo estas tio, kio estas parolata, legata kaj skribata de kolektivo da homoj en ĉiaj rilatoj, situacioj kaj pro tre diversaj privataj kaj grupaj celoj kaj inklinoj.

Do resume ni povas diri pri la aserto ke ni rigardu Esperanton ne la definitiva solvo, sed estu ĉiam pretaj akcepti, defendi, disvastigi pli taŭgan, ke oni bone atentu jenajn konsekvencojn.

1. ~~La koncerna aserto subfosas la la~~ boron por la akceptigo de Esperanto.
2. Ĝi supozigas ke apud Esperanto alia lingvosistemo povas atingi similan kaj kompareblan nivelon koncerne lingvan evoluon kaj uzatecon.
3. Ĝi antaŭkondiĉas, ke ia alia lingvo havos eĉ tiom da kvalitoj, ke tio pravigas la interŝanĝon de Esperanto.
4. Ĝi implicas ke oni devus likvidigi la nunan Esperanto-movadon por anstataŭigi ĝin per alia, kio kostus multegan laboron, tempon kaj monon, ĉar neniu alia lingvo-projekto estas ligita al tia ampleksa movado kia la Esperanto-movado, konsiderinde granda laŭ anaro, literaturo, servoj, prestiĝo.
5. Ĝi signifas ke eventuale oni flanken ŝovu la gradon de lingva evoluo de Esperanto, atingitan pro multjara uzado fare de multaj miloj da homoj, kaj rekomencu per nova lingvo-sistemo ankoraŭ evoluigenda.

Jen la tialoj, kiuj detenas nin riski la akiritan stadion sur la vojo al ĝeneraligo de la internacia lingvo.

K. Wilgenhof.

Internaciaj Feriaj Kursoj: Helsingör, Danlando de 18 ĝis 25-7-1953. Aliĝpetojn sendu al sro L. Friis, Ingemannsfej 9, Aabyhoj (Danl.) ĉe kiu prospekto estas havebla. Okazos nederlanda karavano, en kiu nur restas kelkaj lokoj por Fl.L.E.-anoj. Prezo ĉ. 2000 fr. b. fr. (inkluzivas ĉion). Petu urĝe detalajn informĉe T. Van Gindertaelen, Raghenoplein 9, Mechelen.

VERDLANDO VOKAS

Sciigo de Radio-Servo de N.C.K.E.

Nova stacio dissendanta Esperanto-programeron.

Bonvolu aldoni al la listo de Esperanto-radio-dissendoj jenan novan eron:

JAUDE:

00.05 - 00.20 Zagreb (Jugoslavio), 264,7 m.: 5 min. da informoj pri la Universala Kongreso de Esperanto kaj pri Esperanto ĝenerale kaj 10 min. pri jugoslaviaj arto, literaturo, muziko k.t.p.

Cetere ankoraŭ validas la malnova listo.

Informojn pri la Esperanto-radio-dissendoj sendu ne nur la radio-stacioj, sed ankaŭ la radio-aŭskultantoj al: S. S. de Jong Dzn, Radio-Servo N.C.K.E., Waltaweg 3, Tjerkwerd (Fr.), Nederlando.

LA STUDANTO

Uitwerkingen van de opgaven in het vorige nummer:

Oefening 7 A:

DRAMAJ SUFIKSOJ

Pliaĝiĝante, J. D. . . . dikiĝis. Li nutris sin . . . lia ventro . . . ampleksiĝis kaj lia mentono duobliĝis. Li havis dikiĝintajn krurojn . . . .
. . ., li tuj laciĝis. Li preferis do sidi 1) kaj . . . fariĝis . . . pli dika: li troviĝis 2) . . . Li turnis sin 3) al la kuracisto.

„Ho, . . !" li ĝemis, „mi tiom dikiĝas! Mia edzino devis pligrandigi miajn vestojn kaj mi devis farigi 4) novan kostumon. Tia dikiĝo 5) fariĝas . . . . Ĉu vi povus sveltigi min?"

„Jes," respondis la kuracisto, „sed mi devigas dikulon . . . manĝi kaj trinki, multe movi sin 6), . . . komenci 7) la tagon . . . . gimnastiko kaj fini 7) ĝin . . . ., naĝi 8) duonan horon. Tiel vi certe malgrasiĝos 9)."

„Mi dankas vin pro via konsilo," retiris sin J., „tiukaze mi preferas resti dika. Ne ĝis revido!"

Oefening 5 B:

DREVES UITTERDIJK (II).

La juna instruisto jam baldaŭ komencis fari grandajn vojaĝojn 1) kaj lerni (studi) lingvojn, ne nur por sia 2) instru(ad)o, sed ankaŭ pro prilingva interesiĝo. Kiam la libertempo komenciĝis 3), li ekvojaĝis (ekvagis) al la eksterlando. Jen 4) li vagis tra Francujo, jen 4) li troviĝis (restadis) en la skandinaviaj 5) landoj, kies lingvojn tre parencajn al lia 6) frisa 5) gepatra (lingvo) li lernis.

Iam li estis en norvega 5) havenurbo, kie li norveg(lingv)e ekbabilis kun kelkaj ŝipanoj sur la kajo. La maristoj iom malfacile esprimis siajn pensojn 7) en la norvega lingvo (norveglingve) kaj demandis 8), ĉu li komprenas 9) ankaŭ la nederlandan lingvon.

Opmerkingen:

1: Ook: sidigi sin (post la promeno) = gaan zitten = eksidi. Beter dan: sidiĝi, hoewel dit vaak gebruikt wordt. Zie „Lingvaj Respondoj" bl. 26.

2: Beter dan: trovis sin.

3: Niet: turniĝis. Het betreft hier een bewuste handeling, voortvloeiend uit een eigen wilsbesluit, en die komt het best tot uitdrukking in de vorm: turni sin.

4: Farigi = laten maken. Niet fariĝi = worden, gemaakt worden.

5: Dikiĝo (= dik worden) beter dan diko (= dikte).

6: Movi sin (bewuste handeling; zie noot 3) beter dan: moviĝi (= in beweging raken).

7: Komenci en fini zijn overgankelijke werkwoorden, die zó een lijdend voorwerp bij zich kunnen hebben. Dus hier geen -ig- of -iĝ- erachter.

8: Naĝi is een onoverg. werkwoord in tegenstelling met bani, dat overg. is. Dus: oni banas infanon, ĉevalon aŭ sin kaj oni naĝas en la akvo.

9: Bijna zou hier ook kunnen: malgrasigos vin (bewuste handeling; zie noot 3).

Li tiom (tiel) nete (plaĉe, korekte, ĝuste) respondis en tiu lingvo, ke ili venigis lin al sia kapitano (ŝipestro) por interkonatigi (interrilatigi) ĉi tiun kun „norvego, kiu tiom bone parolas 10) la nederlandan lingvon".

(Daŭrigota).

1: Ook: ekentreprenis grandajn vojaĝojn kaj ekstudis . . . . . .

2: Niet: lia. Bezit v.h. onderwerp.

3: Komenci is overgankelijk en moet hier onovergankelijk worden gemaakt met -iĝ-.

4: Ook: Kelkfoje . . . ., alifoje . . .

5: Onnodig in 't Esp. bijvoegelijke naamwoorden met een hoofdletter te schrijven, ook al zijn ze afgeleid van aardrijkskundige eigennamen.

6: Niet: sia. Immers niet het bezit van het logisch onderwerp van „parencajn" (lingvojn). Ook: . . . landoj, de kiuj li lernis la lingvojn, kiuj estas tre parencaj al *lia* frisa gepatra (lingvo).

7: M.i. beter dan: esprimis *sin*.

8: Niet: peti = vragen (= verzoeken). Vragen (= een vraag stellen) = demandi.

9: Indirecte rede.

10: Woordelijke aanhaling: directe rede.

NIEUWE OPGAVEN

Oefening 8 A:

Vertaal in het Esperanto:

DE SLIMME BOERENKNEHT

Piet had de lagere school doorlopen. Hij had al leren melken bij een boer. Deze boer huurde hem als knecht. Piet molk de koeien met de hand en later ook met de machine. Hij maaide het gras met de zeis en met de machine. Hij hield ervan het paard te mennen, maar zat nog liever op een trekker. In de hooiing harkte hij met de hark en de machine. Hij voerde het hooi van het land naar de schuur met de hooiwagen.

De boer vroeg hem naar de buurman te gaan om de hooischaar te lenen. Piet zwierf van de ene buurman naar de andere. Telkens was de schaar „uitgeleend". Piet reisde naar de stad, kocht in een ijzerwinkel een grasschaar en bracht die de boer met de rekening. De boer glimlachte en tracteerde Piet en deze dankte de boer voor de vrije dag.

Oefening 6 B:

DREVES UITTERDIJK (III)

Niet alleen het Noorden, ook het Zuiden trok hem aan. Hij bezocht meermalen Frankrijk en eens zelfs Algiers en de Levant. Hij was de Franse taal goed meester, omdat hij daar op school les in gaf. Aan boord van een toeristenschip in de Middellandse Zee reisde hij met een zeer internationaal gezelschap, waaronder de bekende Franse Esperantist Louis de Beaufront, die hem op de hoogte bracht met de taalschepping van dr L. L. Zamenhof. Hij werd terstond zo gepakt door die gedachte, dat hij, toen hij weer thuis was, het Esperanto-leerboek van De Beaufront in het Nederlands bewerkte. Dat was het begin van zijn Esperanto-pioniersarbeid in Nederland.

(Wordt vervolgd).

Uitwerkingen van Vlaamse Esperantisten vóór 10 April 1953 aan V.E.B., „Studanto", postbus 100, Mechelen; van Nederlandse aan S. S. de Jong Dzn, Waltaweg 3, Tjerkwerd (Fr.).

Wie een gefrankeerde enveloppe voor terugzending erbij voegt, krijgt het werk gecorrigeerd terug.

KOMUNIKOJ DE LA LIBRO-SERVOJ

	Gld.	Belg. Fr.
Vijf Kunsttalen, de D-ro Manders	7,50	100,—
Interlingvistiko kaj Esperantologio, de D-ro Manders	2,25	30,—
La alia pasinteco (R. Bulthuis; jus aperinta romano de la filo de la konata verkisto. Trad. de S-ino Isbrucker)	4,90	80,—
La karnavalo kaj la somnambulino (nova epoko libro)	2,35	28,—
La mondo ne havas atendejon, de M. Dekker, trad. de F. Faulhaber	2,50	34,—
La verda koro, de Julio Baghy	2,25	25,—
Rembrandt, la magiisto	5,—	65,—
Pordoŝildo kun stelo kaj „Esperanto parolata"	0,65	12,—
Arĝenta kulero kun stelo kaj bildo de Zamenhof	7,50	
La Sankta Biblio (bind)	5,50	60,—
Leteroj de Zamenhof (du volumoj) po volumo	8,55	130,—
Vivo de Zamenhof, de E. Privat	3,25	40,—
Fundamenta Krestomatio, de Zamenhof	5,20	85,—
Aktualaj Problemoj, de Prof. Lapenna	5,—	65,—
Retoriko, de Prof. Lapenna	5,50	70,—
Kon-Tiki (belega donaco)	14,50	165,—
Morto de trajno	5,30	63,—
Kredu min, sinjorino	5,40	72,—
Miru, Pensu, Ridu	5,40	72,—
Internacia kantaro (kun muziko)	3,25	
Internacia kantaro (sen muziko)	1,25	
Kanteto belsona, de S. S. de Jong	0,05	
Komercaj leteroj (C. W. Pruisen) Komerca korespondo	1,30	14,—
Diversaj insignoj	1,10	
por kravato		10,—
rondforma		12,—
pentagonforma		13,—
stelforma		13,—
10 leterpaperoj + kovertoj (kun lingvo internacia)	0,50	
Bloko da leterpapero grandformata (100 leterpaperoj kun verda stelo)		40,—
idem, malgrandformata		25,—
Kovertoj kun verda stelo, (bonega kvalito) po 0/0		50,—
STUD- kaj LERNOLIBROJ		
Esperanto leren lezen	1,—	15,—
Vortoj kaj esprimoj (Zondervan)	1,15	15,50
Esperanto in 20 lessen, de H. Bakker	3,—	36,—
Esperanto leerboek F. Randi		30,—
Sub la verda standardo (P. Korte) rektmetoda kurso por infanoj: gvidilo	2,50	
laborilo I	0,80	12,50
laborilo II	0,90	12,50
memorigilo	0,65	
Esperanto leerboek voor kweekschool ULO en Middelbare scholen (Zondervan en Manders)	2,50	34,—
Tra la labirinto de la gramatiko	5,90	85,—
La konsilanto pri la Esperanta gramatiko (Degenkamp)	2,75	
Post la kurso, de G. P. de Bruin kaj F. Faulhaber	2,—	
Esperanta Krestomatio, dua eldono (ekzameno A)	1,95	24,—
Esperanto leerboekje de H. Appel, I kaj II po volumo	1,50	20,—
Plena vortaro	11,50	175,—
Zakwoordenboek, de Alings	0,50	
Zakwoordenboek Debrouwere G.		5,—
Ni havas ankoraŭ kelkajn *ekzemplerojn de Schidlof's zakwoordenboek por po*	2,15	45,—

MENDU ĈE:

Libro servo LEEN, Z.O. Singel 5 te Bergen op Zoom

V.E.I., Blankenbergsesteenweg 72, Brugge.

VERSLAG 1952.

Alg. Ned. Esp.-Examen-Comm.

(slot)

Het percentage geslaagden is 68,4. De afgewezenen bleken over de gehele linie onvoldoende. Het gemiddeld cijfer voor de vertaling Nederlands-Esperanto is 5,6. Nog altijd bleek dit vak het grote struikelblok. Vele candidaten (ook onder de geslaagden) werken zeer slordig, slaan woorden of delen van zinnen over en weten geen raad met het weergeven van de modaliteiten van de zin. De vakken literatuur en geschiedenis waren over het algemeen goed verzorgd. De spreekvaardigheid gaat helaas achteruit. In 1950 werd voor dit vak achtmaal een 8 toegekend: dit jaar kon slechts één candidaat een 8 behalen. De commissie wijst op de noodzakelijkheid, dat a.s. cursusleiders een correcte uitspraak hebben en ook in het spreken niet zondigen tegen de voornaamste regels der spraakkunst.

		Debet	Credit
Saldo 1951		f 237,20	
3 cand. 1951		- 12,—	
Bijdr. 4 org.		- 60,—	
Onk. jaarverg.			f 102,45
Ex. A'dam:			
Ontv.	f 173,50		
Uitg.	- 91,42		
		- 82,08	
Ex. Gron.:			
Ontv.	f 35,65		
Uitg.	- 33,75		
		- 1,90	
Ex. Haag:			
Ontv.	f 289,75		
Uitg.	- 120,92		
		- 168,83	
Ex. Utrecht:			
Ontv.	f 211.25		
Uitg.	- 175,28		
		- 35,97	
Adm. onkosten			- 133,11
Drukwerk			- 149,86
Saldo 1952			- 212,56
		f 579,98	f 597,98

NED. ESPERANTISTEN-VEREN. „LA ESTONTO ESTAS NIA"

Alg. Secretariaat, schr. cursus voor beginners en uitleendienst: Mr A. J. Kalma, Stadionkade 6, Amsterdam-Zuid, tel. 96160.
Penningm.: P. M. Mabesoone, Pythagorasstr. 122. Amsterdam-O, postrek. 34563.
Boekendienst, schr. cursus voor gevorderden en dipl. B: H Appel, Z.O.-singel 5, Bergen op Zoom, postrek. 76915.
Bibliotheek: E. A. Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht.
Propaganda-dienst: H. Bakker, Van Tuyllplein 33/1, Amsterdam-Zuid, tel. 95320.
Alg. Ned. Esp. Examen-comm.: Mej. H. M. Mulder, Zilvermeeuwstr. 29, Badhoevedorp
Ĉefdel. U.E.A.: J. Telling, Schietbaanlaan 106, Rotterdam. Postrek. 242619.
Vic-ĉefd. F. Weeke, Zwolseweg 172 A, Diepenveen. Postrek. 22075.

Flandra Ligo Esperantista.

Postbus 100, Mechelen

Prezidanto: *Gerard Debrouwere, Magdalenastraat 29, Kortrijk.*
Sekretario: *Maertens G., Pr. Leopoldstr. 51, Sint-Kruis, tel. 33445 (dum la oficoroj).*
Kasistino: *F-ino J. Terrijn, Raapstraat 74, Gent.*
Biblioteko: *E. A. Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht (Nederland)*
U.E.A. peranto: *Dr. F. Couwenberg, Koninginnelaan 14, Blankenberge P.C. 4161.35.*
Redakcio F.E.: *Dr. T. van Gindertaelen, Raghenoplaats 9, Mechelen (tel. 136.77)*
Koresponda kurso: *A. Nysstraat 37, Anderlecht*

KOMUNIKOJ DE LA ĈEFESTRARO

Post nelonge la sekcioj ricevos la tagordon de la jarkunveno en Antwerpen, por ke la membroj en speciala kunveno povu pritrakti ĝin kun la delegitoj. Ni denove atentigas pri tio, ke la delegitoj ĉi-jare ricevos duoblan kompenson pro la altaj kostoj, kiujn kaŭzos la vojaĝo al Antwerpen kaj la restado en la kongresurbo. Krome ĉiuj sekcioj ricevos formularon por la delegitoj. La supran duonon oni resendu al la ĝen. sekr. **antaŭ la 10-a de majo.** Kiel kutime aperos en la tagordo la punkto: „Kritiko pri la gvidado de la ĉefestraro kaj kritiko pri la redaktado de nia gazeto". Oni sciigu event. pritraktotajn temojn kiuj koncernas ĉi tiun punkton de la tagordo **antaŭ la 15-a de majo** al la ĝen. sekr.

Kiam la artikolo pri la naturkatastrofo, aperinta en la antaŭa numero jam estis kompostita, ni ankoraŭ ricevis diversajn kondolenc-esprimojn, i.a. de Kroatia Esperanto-Ligo el Zagreb, Esperantista Societo „Bude Borjan" el Zagreb, Esperantista Societo de Novi Sad (Jugoslavujo), Esperantista Rondo en Strakonice (Ĉeĥoslovakujo), S.A.T.-rondo el Hamburgo kaj s-ro J. Soriano el Cuxac d' Aude (Francujo), sekr. de la grupo en Narbonne.
Nian elkoran dankon al ĉiuj!

LA NATURKATASTROFO

En multaj nederlandaj gazetoj aperis detalaj informoj pri la katastrofo kaj ni atentigas niajn membrojn kiuj deziras informi siajn eksterlandajn korespondantojn pri n-ro 4 de „Heroldo de Esperanto" de 1/3 1953, kiu enhavas detalajn raportojn pri la inundo.

Multaj verŝajne legis pri la mirakla savo de Kolijnsplaat, sed ili certe ne scias, ke nia membro s-ro P. J. Bom, skabeno de Kolijnsplaat, ludis ĉe tio gravan rolon. El letero de nia ano s-ro G. F. Maris el Kolijnsplaat ni citas la jenon: „Miraklo inter mirakloj . . . nia vilaĝo ne subakviĝis. La marakvo atingis la supron de la digo. Okaze de alta maro oni metas flustabulojn en la enirejon de la haveno, por reteni la marakvon.

La tabuloj tamen ne povis kontraŭstari la impetajn ondojn kaj estis cedontaj . . . La rigardantoj komprenis la danĝeron kaj forkuris por savi sian vivon, sed sub gvido de s-ro Bom cento da viroj metis siajn ŝultrojn kontraŭ la tabulojn por tiel reteni la furiozantan maron. La situacio estis ege danĝera, ĉar se la ondoj venkus, la viroj dronus. Tial ili nepre devis persisti. Tiam okazis li miraklo. La maro alpelis drivantan ŝipon kaj jetis ĝin ĝuste antaŭ la flustabulojn, tiel ke ĝi rompis la forton de la furiozaj ondoj kaj tiamaniere nia vilaĝo kaj la poldero estis savitaj . . . ."

Ni ricevis la informon ke S-ro Maris, ĝenerala membro de L.E.E.N. loĝanta en Noord-Beveland, bone travivis la katastrofon sed bedaŭrinde S-ro Bareman el Wolfaartsdijk apud Goes ne havis tiun bonŝancon. Li perdis sian tutan havaĵon kaj loĝas nun ĉe sia filo en Goes. Li estis savata per remboato. Lia sanstato estas sufiĉe bona.

GRAVA KOMUNIKO.

Ni ricevis informon de Prof. Lapenna, ke li disponigas 10 ekzemplerojn de „Aktualaj Problemoj de la Nuntempa Internacia Vivo" por la viktimoj de la katastrofo. Oni mendu ĝin ĉe la Libroservo de LEEN. La tuta sumo iros al Nationaal Rampenfonds.

Ni volonte aldonas, ke oni kaptu la okazon, havigi al si valoran verkon kaj samtempe helpi la suferantojn.

ESPERANTO EN POPOLUNIVERSITATOJ

La popoluniversitataj kursoj en Hago kaj Amsterdam, kiujn gvidis s-ro S. Pragano, finiĝis en ĉi tiu monato. En ambaŭ urboj okazis festa finleciono, organizita en Hago de nia tiea sekcio kaj en Amsterdam de la loka kunlaborkomitato E.K.A. En Hago i.a. parolis s-ino J. Isbrücker kaj solkantis f-ino A. D. Tusveld. En Amsterdam solkantis f-ino A. Schoen, kiun E.K.A. „pruntis" de sekcio Haarlem. En ambaŭ vesperoj parolis krome la prez. de N.C.K.E., s-ro A. J. Kalma. La haga popoluniversitato favore raportis pri la kurso al la sekr. de la ligo de popoluniversitatoj en Nederlando. Verŝajne do en la venonta jaro ankaŭ en aliaj urboj la popoluniversitato enprogramigos Esperantan kurson. Ni instigas niajn sekciojn kaj lokajn kunlaborkomitatojn *jam nun* interrilati kun la lokaj popoluniversitatoj kaj rekomendi enprogramigon de lecionoj pri Esperanto.

C.A. TEN SELDAM DOKTORIĜIS

Lundon la 16-an de marto doktoriĝis ĉe la universitato en Utrecht s-ro C. A. ten Seldam, ano de nia sekcio en Amsterdam kaj sekretario de la Universitata Esperantista Rondo Amsterdama. Al sia disertacio (titolo: „Energies and polarizabilities of compressed atoms") li aldonis Esperantlingvan tradukon de la unua ĉapitro. Krome unu el liaj tezoj temas pri la taŭgeco de Esperanto kiel internacia lingvo por la scienco.

La promocio okazis „cum laude". Inter la ĉeestantoj ni vidis i.a. reprezentantoj de ĉefestraro de LEEN kaj de Sekcio Amsterdam.

Ni kore gratulas doktoron ten Seldam (ankaŭ Fl.L.E. kaj speciale Dro. T. Van Gindertaelen)!

Esperanto-Persdienst L.E.E.N.

De leider van onze persdienst zond ons een rapportje over de maanden Nov. en Dec. van het afgelopen jaar dat echter door de gebrekkige medewerking van onze leden verre van volledig was.

Voor het samenstellen van een zo volledig mogelijk overzicht is het noodzakelijk, dat onze persdienst *alles* ontvangt, wat in de plaatselijke pers, weekbladen, buurt- en verenigingsorganen, personeelsbladen enz. verschijnt en met Esperanto, het wereldtaalprobleem, de spraakverwarring, onze beweging en ons streven direct of indirect verband hondt. Wij doen daarom nogmaals een beroep op *al onze leden* om dergelijke berichtjes en artikelen b.v. verslagen of aankondigingen van afdelingsbijeenkomsten en congressen, nieuws over de beweging in het buitenland, artikelen over taalmoeilijkheden bij internationale bijeenkomsten, mededelingen over het gebruik van Esperanto in de practijk (radio, film, toerisme, handel etc.) uit te knippen en als drukwerk te zenden aan de Esperanto-Persdienst L.E.E.N., de heer H. Oosthoek, Bree 49a, Rotterdam. Noodzakelijk is vermelding van de naam van het blad en de datum van verschijning b.v. „Groene Bode" 15/2."

Verschillende afdelingen verzuimden tot nu toe een plaatselijk vertegenwoordiger voor onze persdienst aan te wijzen. In plaatsen waar wij geen afdeling hebben kunnen algemene leden of leden van U.E.A. zich opgeven als medewerker Esperanto-Persdienst L.E.E.N. van onze persdienst. Om onze berichten op zo ruim mogelijke schaal te kunnen verspreiden is het nodig, dat onze persdienst in zoveel mogelijk plaatsen over medewerkers beschikt. Meldt U daarom als „vrijwilliger" aan bij de leider van onze persdienst, de heer H. Oosthoek.

.....

Philips - Esperanto-klubo organizos vojaĝon al Aŭstrio (Wörgl), kiu okazos de la 25-a de Julio ĝis la 3-a de Aŭgusto. Por ĉi tiu vojaĝo kelkaj lokoj estas ankoraŭ disponeblaj. La vojaĝkostoj estas gld. 70,— p.p., inkluzive: 1. varmaj manĝoj por 8 tagoj en hotelo. 2. Dormado en junulargastejo. 3. Teo. 4. servmono por la ŝoforo. 5. Admin.kostoj. 6. Pano (sen butero aŭ viandaĵo). Petu informojn ĉe S-ro J. Mols, Genneperweg 34 en Eindhoven.

.....

„Nia Diligenta Kolegaro".

Al ĉiuj, kiuj kunlaboras al la sukceso de la disvastigado de la decido de UNESCO, ni kore dankas.

La loka komitato en Eindhoven jam mendis 200 ekzemplerojn. Bonega ekzemplo.

Oni sendu ĝin al ĉiu, kiu havas rilatojn kun alilingvaj regionoj aŭ plenumas gravan funkcion, ĉar tiaj personoj devas nepre konatiĝi kun la enhavo.

Krome ĝi estas posedinda dokumento por ĉiuj Esperantistoj ĉar ĝi estas el historia vidpunkto tre grava.

Oni do tuj mendu per la ĝirkonto No 24.39.98 de H. Oosthoek, Bree 49-a, Rotterdam. La prezo estas por unu ekzemplero gld. 0,10; por cent gld. 5,50.

ESPERANTO-KOMITATO INTERGRUPA BRUGGE (EKI).

Dimanĉon la 8an de Marto la gemembroj de „Paco kaj Justeco" estis la gastoj de la „Reĝa Bruĝa Grupo Esperantista". Oni interkonatiĝis, kantis, la du prezidantoj paroladis. Ĉio en preparo al la komuna Beneluksa Esperantokongreso.

La jaŭdon poste, la 12an de Marto, kvar komitatanoj de ambaŭ starigis EKI por kune agi en aferoj de pura Esperanto-intereso.

Konata bruĝano, la dentisto Et. De Craecke, *akceptis la honoran prezidantecon. Por 1953 jen la estraro: Prezidanto: Sro* Ch. Poupeye, *prezidanto de la „Reĝa Bruĝa Grupo Esperantista". Vicprezidanto:* Drs. F. Roose, *prezidanto de „Paco kaj Justeco". Sekretario: Sro* André Dumarye *(Fl. Ligo), Generaal Lemanlaan 142, Assebroek. Kasisto: Sro* Georges Groothaert *(Belga Ligo).*

Nia Ĉef-estraro kore gratulas la bruĝajn EKI-anojn! Ĝi ankaŭ atentigas pri nia Kongreso: se la aliĝoj regule envenas, tamen ne sekvas la mendoj kaj pagoj por la diversaj aranĝoj. Ni nepre insistas por eviti seniluziiĝojn koncerne la hotelojn — la disponeblaj ĉambroj ne tiom abundas, eĉ ne en Antwerpen. Do, ek!

KIAL ESPERANTO NE JAM KONKERIS LA MONDON?

Jen demando, ofte farata de kontraŭuloj de Esperanto, demando al kiu respondi estas malfacile. Ni scias ke en tiu rilato kun- (aŭ pli bone: kontraŭ-) laboras diversaj kaŭzoj, ekz. la mondmilitoj, ekonomiaj cirkonstancoj, naciismo, k.t.p. kaj ne malpli la fakto ke la esperantistaro ne (jam) montras disciplinon kaj unuecon. Oni ne povas neglekti ke internacia lingvo pro tio bezonas longan tempon por enradikiĝi. Kvankam Dro Zamenhof en sia unua entuziasmiĝo esperis, ke lia projekto baldaŭ ĉie enpenetriĝos, li poste tamen spertis ke la vojo estas longa. En tiu periodo li verkis la konatan poemon, el kiu mi ĉerpas jenan strofon:
„Ni paŝon post paŝo, post longal aboro, atingos la celon en gloro".

Do jam Dro Zamenhof atendis longan laboron! Konsiderante tion ni, liaj adeptoj, ne miras ke nia idealo ne jam konkeris la mondon.

Ekzistas tamen speco de klarviduloj en la mondo, kiuj trovis la respondon al supra demando; ĝi tekstas (bonvole ne ridu!): La homoj sentas kaj daŭre sentos instinktan antipation por tio, kio aspektas artefarita (!).

Do jen la kaŭzo! La ovo de Kolumbo! Esperanto aspektas artefarita kaj tial la mondo, kies loĝantoj dronas ĉiutage en la artefaritaĵoj, ne akceptas ĝin.

Kaj la solvo? Nu, ekzistas alia lingva projekto, kompreneble pli bona ol Esperanto, bazita sur la principo de la maksimuma internacieco, nome (vi jam divenis) „Interlingue". Ĉu vi neniam aŭdis pri tiu lingvo? Ne gravas. Antaŭ kelkdekoj da jaroj iu Edgar de Wahl (iama esperantisto!), provante ornami sin per alies plumoj, „inventis" Occidental. La projekto, same kiel multaj similaj post-Zamenhofaj, ne trovis konsiderindan nombron da adeptoj. Kelkaj el ili, plorante pro la fiasko, finfine klopodas propagandi ĝin denove, sed, timante novan malsukceson, ornamis la projekton per la nomo „Interlingue" (vorto de maksimuma internacieco!). Kaj oni ekagis. Kiel? Nu, ili klopodas konkeri la mondon per mallojala uzado de esperantistaj adresaroj.

Eble ankaŭ vi trovis stencilitan cirkuleron en via leterkesto. Tiu fakto ne estus menciinda, se la sendinto ne estus (estinta) esperantisto, kiu (mis-) uzas la „artefaritan" Esperanton por rekomendi la „maksimuman internacieco". Laŭ artikolo en „Laborista Esperantisto" tiu sama sinjoro, iama F. L.E.-ano, en la tempo kiam li estis bona esperantisto, indignis pri la malĝusta kaj trompa propagando, kiun uzas Interlingue-anoj kontraŭ Esperanto. Tiam li laŭvorte diris: Oni havas nenian komprenon pri Esperanto (!). Evidente li mem perdis tiun komprenon kaj sekve fariĝis Interlingue-ano, kontraŭulo do de Esperanto. Kaj konsekvence li aplikas la saman manieron de reklamo, kiun li iam malestimis. Estas tragike, jam Dro Zamenhof spertis tion, ke la plej danĝeraj kontraŭuloj de Esperanto estas la iamaj esperantistoj, seniluziigitaj de la konstato ke la laboro estas longa.

La veneno estas en la vosto; oni povas konstati tion ankaŭ en nomita pamfleto. Dolĉtone la sendinto esprimas sian respekton por la nelacigeblaj amikoj esperantistaj, samtempe oferante sian varon! Kaj la rezulto? Via poŝo malpleniĝos, lia ŝvelos. Karaj gelegantoj, gardu vin kontraŭ tiaj lupoj en ŝaffeloj.

La laboro estas longa, sed paŝon post paŝo ni atingos la celon en gloro!

P. M.

Plaatselijk Nieuws

Amsterdam: Mardon 13/1 s-ro Mabesoone faris lumbildprelegon pri sia vojaĝo al Italujo kaj f-ino A. C. H. v. d. Beek rakontis pri siaj Kristnaskaj travivaĵoj en Belgujo. Ambaŭ junaj geanoj flue parolis kaj donis imitindan ekzemplon al tiuj anoj, kiuj regule vizitas la kunvenojn, sed same regule silentas! Mardon 10/2 s-ro J. L. Mast faris interesan lumbildprelegon pri sia vojaĝo al Alĝerio. Nia sekcio aranĝis „buntan vesperon" je 23/2. Deklamis s-roj A. Lodema, J. Rooker kaj A. J. Kalma. Krome okazis cerbogimnastiko. Pro malsano s-ro G. J. Degenkamp je 10/3 ne povis fari sian prelegon pri „la eterna konflikto." Anstataŭ tio s-ro A. J. Kalma prelegis pri „Bonhumoro en Esperanto".

Bussum: Nia sekcio pritraktis 1/2 la elparoladon de Esperanto. S-ro A. J. Kalma aŭdigis kelkajn gramofondiskojn i.a. pri la elparolado de E. Privat kaj de la „Lingua"-kurso.

Den Haag: 2/4. F-ino A. D. Tusveld promenos kun ni sur la laborkampo Haga Esperantista Kunlaborkomitato 9/4. S.ino J. G. Bramkamp-Weber lumigos por ni la mondfaman nederlandan pentriston Rembrandt van Rijn.
16/4. Generala kunveno.
23/4. F.ino S. L. C. Biesma igos nin serĉesplori bibliotekajn aferojn.
30/4. Diversaĵoj.

Groningen: 2/4 Komuna vespero en R. Weeshuisstr. Programo de F.L.E.; 9/4 Paska ferio; 16/4 s-ro H. Behr montros filmon pri Curaçao aŭ Venecio; 23/4 Prelego de s-ro C. Albers; 30/4 Prelego de f-ino M. Meijwes.

Haarlem: La estraro aranĝos ekspozicion „FLORA" je sabato la 25-a de Aprilo 1953. Ni kolektiĝos je la 2-a kaj duono ĉe la stacidomo *Heemstede-Aerdenhout* kaj iros aŭtobuse al „Flora". Proksimume je la 7-a ni komune panmanĝos (kunportu buterpanon) poste ni promenos tra la lumigita urbo. Esperantistoj eksterurbaj estas kore invitataj. Kostoj proks. gld. 2,—. Aliĝu tuj ĉe la sekretariejo Lorenzkade 338, Haarlem.

Mechelen: Ons programma van de Aprilvergaderingen ziet er uit als volgt: 1/4, Gramatiko; 8/4, Enigmoj; 15/4, Variaĵoj; 22/4, Prelego; 29/4, Diversaĵoj.

—

N.B. Niaj geanoj nepre tuj aliĝu al la Kongreso kaj samtempe faru la mendon kaj la pagon de ĉiuj aranĝoj. Precipe koncerne la hotelojn, pro la manko de multaj ĉambroj, la situacio tre rapide fariĝos malfacila! Oni sin ev. turnu al T. Van Gindertaelen, Raghenoplein 9.

—

La skribaj kursoj en „De Typhoon", „Noord-Amsterdammer" kaj „Nieuwe Noord-Hollandse Courant" finiĝos komence de aprilo. Okazos postkursaj ekzamenoj sabate 15-18 h., nome 11/4 en „Karseboom" en Zaandam, 18/4 en „Tolhuis", Amsterdam-N. kaj 25/4 en „Herenlogement" Purmerend. Ĉiuj kursanoj partoprenos festan kunvenon je ĉielirtago 14/5 en „Herenlogement", Purmerend, kiun ĉeestos krome eksterlandaj esperantistoj. Kunlaboros i.a. s-ro A. Cseh kaj s-ro P. Delaire (Francujo). La floranta Beemster atendas multajn esperantistojn el tuta Nord-Holando!

Anoncetoj

Deziras korespondi kun H.L.E.-an-(in)oj: 36-jara malsanulo, p.m., let., kaj sendo de foto: Jer. HARMENS, Kuracejo „Beatrix-Oord", Appelsga (Friesl.), Nederlando.

NIAJ ESPERANTO-ENIGMOJ KUN PREMIOJ.

PREMION akiris post n-roj 145-146: F-ino C. Boute, el Blankenberge, por V.E.B., kaj por L.E.E.N.: Sro A. Lodema, el Amsterdam.

SOLVOJ.

146. Horiz.: kvast, fetor, malsekretig, kakao, obsed, brajl, spes, aviz, obtuz, febr, ofer, basen, esti, ostr. Vert.: komik, ampleks, aplik, absorbi, trezor, artism, fervoj, blazono, tetas, evident, rigid.

147. Korpulenta, kapriolo, ĝangalo, aŭtobuso, distribui, kulmino, kurento, frekventi, edelvejso, kanajlo, salajro, miopa, najado, dromedaro, monogramo, krom.

Mi rakontis al maro senborda
Pri la grandaj turmentoj en koro
Kaj per bruo mallaŭta de l' ondoj
Ĝi respondis al mi kun favoro.
Fund. Krest. p. 366;)

148. Horiz.: papav, ŝatat, nekalkulebl, kulpi, aspir, apert, ogiv, akvo, intim, ĝerm, putr, egali, eter, lito. Vert.: panik, ungvent, pikil, pavimer, velŝip, estrar, ŝtupar, stampil, tremp, invitit, toler.

149. KUNMETU

el la subaj litergrupoj naŭliterajn vortojn laŭ jenaj klarigoj:

1. tagofino, 2. priparoli, 3. ŝveligi, ekz. pneŭmatikon, 4. elmigrinto, 5. tre bone videbla. 6. aparte atentigi. 7. provizore kunigi per fadeno, pp tajloro. 8. en pli malgranda kvanto ol la nepre nenecesa. 9. malkorektaĵo en libro. 10. floro sur lageto. 11. amafero. 12. buo. 13. vundi per ungoj. 14. malpliiĝo de la taglumo. 15. de antaŭe scii. 16. geometria figuro. 17. li certigas fakton kiun li vidis. 18. oficejo kiu helpas al turistoj. 19. per ĝi oni envolvas ĉokoladon. 20. signalilo sur ŝipo. 21. titolo. 22. hejtaĵo. 23. vestaĵo ŝirmanta kontraŭ malpuriĝo. 24. miriga homo. 25. celanta nur gajnon. 26. li vendas multekostajn ornamaĵojn. 27. fariĝi pli multekosta. 28. ĉiuj restadantaj en iu loko. 29. malfluidiĝi pp sango. 30. ne facile kontentigebla.

- La triaj literoj legataj de supre malsupren formas proverbon.

La litergrupoj: abu, akv, ami, ang, ang, ant, ant, ant, apa, ark, aro, aro, ate, aŭt, aŭv, bar, dri, duo, ego, ejo, eli, elo, ema, ema, ezo, faj, fil, fit, gra, gul, ibo, idi, igi, igo, iĝi, iĝi, iĝo, inf, juv, kar, koa, kti, lfr, lio, lio, loĝ, mal, naĝ, nbl, nda, ndi, nfo, nka, nku, nok, nto, nto, ntr, oku, oli, orm, ovi, per, ple, pli, pos, pre, pri, pro, rbo, rif, rim, ser, skr, sta, sta, sto, str, sur, ŝto, tom, tra, tri, tul, tvu, uĝi, uko, ulo, ulo, ves.

150. KRUCVORTENIGMO.

Horizontale. 2. soldataro; returna, responda ago. 3. strata malpurajo(R). 4. rita vesto de ekleziulo(R); malsaĝulo(R). 5. maljesi(R); panbuleto; prepozicio. 6. altgrade; pistita greno(R). 7. manĝebla planto(R). 8. naski deziron(R); lumplena(R). 9. aldona(R). 10. tubo en la korpo(R). nimfo(R).



Vertikale. 1. veturilo(R); korpoparto(R). 2. kaptilo(R). 3. ŝirmita kontraŭ infekta malsano(R); ĝi troviĝas sur kverko(R). 4. zumanta insekto(R). 5. noktobirdo(R); elirigi(R). 7. herbaĉo(R); kredi, ke io estas ia(R). 8. punkto de religia kredo(R). 9. floro(R); varmigi(R). 10. narkota substanco(R). 11. arterio; parolado por defendi sian aferon.

La solvojn sendu la nederlandanoj al *S-ro G. J. Teunissen, Burg. Tellegenstr. 21 hs., Amsterdam-Z.*, kaj Flandra Ligo al S-ro *F. Couwenberg, Koninginnelaan 14, Blankenberge*, antaŭ la 20-IV-1953.

Asocia Jarraporto La Estonto Estas Nia

Sekcioj: Komence de la jaro 1952 L.E.E.N. havis 28 sekciojn. Aliĝis novaj sekcioj en Rotterdam (Esperanto Estu Nia Celo), Treebeek kaj Zaandam. Feliĉe en 1952 ne perdiĝis sekcioj kvankam kelkaj ankoraŭ daŭre agonias, do fine de la jaro la nombro estis 31. Okaze de la jarŝanĝiĝo pluraj anoj eksiĝis, multfoje kontraŭregulare sciiginte sian eksiĝon nur en januaro 1953, sed manko de disciplino ŝajne ne estas tute forigebla. La sekciaj kotizoj varias de gld. 4,50 ĝis gld. 13,— en jaro, laŭ la lokaj bezonoj. La plimulto el la sekcioj enkasigas la kotizon kvaronjare, kelkaj ĉiumonate aŭ eĉ ĉiusemajne. La lasta metodo havas la avantaĝon ke iu el la estraranoj daŭre kontaktas kun la membroj kaj certe estas preferinda ol enkasigo de tutjara kotizo je la jarfino, ĉar pluraj anoj tiukaze sciigas ke ili jam eksiĝis kaj rifuzas pagi aŭ intertempe transloĝiĝis al nekonataj adresoj . . . . Plej ofte niaj sekcioj kunvenas ĉiusemajne aŭ dufoje en monato. Kelkaj neregule kunvenas; aliaj tute ne aranĝas kunvenojn. En pluraj lokoj ekzistas lokaj kunlaborkomitatoj, kiuj regule okazigas komunajn kunvenojn. Laŭtradicie la sekretarioj en Almelo, Sneek kaj Heerenveen rifuzis respondi al ni. Ĉijare Veendam aliĝis al la silentanta trio. Nu, ni volonte pardonas al tiuj funkciuloj, ĉar skribado de **unu** letero dum tuta jaro ja estas ampleksa tasko, kiu forrabus tro multe da tempo! Ni deziras agrablan dormon! Feliĉe la prezidantino de sekcio Almelo sukcesis portempe veki la sekretarion kaj havigi al ni la petitajn informojn.

Kursoj: En la enkonduko mi jam aludis la fakton, ke nur malmultaj sekcioj sukcesis aranĝi kursojn por komencantoj. Bedaŭrinde estas neeble publikigi fidindan statistikon, ĉar pluraj sekcioj nur parte aŭ tute ne respondis al la koncernaj demandoj. Ĝojige estas, ke en kelkaj lokoj, ekz. en Zeist, oni sukcese propagandas inter gejunuloj. La gejunuloj en Deventer, kiuj parte studas en la tiea seminario, montras laŭdindan aktivecon kaj aperigas propran stencilitan bultenon „LA PAPAGETO". La skribajn kursojn partoprenis nur kelkaj personoj; tamen la kurso por komencantoj, kiun gvidas s-ro S. S. de Jong Dzn. denove rezultigis modestan monprofiton. La interesiĝo pri la planitaj someraj kursoj Fl.L.E.-L.E.E.N., por kiuj ni luis „Het Trefpunt" en Ermelo, estis tiel malgranda, ke lastmomente ni devis decidi ne okazigi ilin. Tiu manko de interesiĝo flanke de nia anaro kaŭzis malprofiton al nia kaso. La fakto, ke centoj da personoj partoprenas la skribajn kursojn, kiuj aperas en diversaj gazetoj, kaj pri kiuj ni jam kelkfoje raportis en nia organo, feliĉe pruvas, ke la interesiĝo pri Esperanto tamen ankoraŭ ekzistas.

Pri tio krome atestas la sukcesplenaj kursoj de s-ro S. Pragano ĉe la popoluniversitatoj en Amsterdam kaj Hago.

Kongreso: Nia 19-a kongreso - la dua komuna kongreso kun Fl.L.E. - okazis je Pentekosto en Rotterdam. La kunlaborantaj sekcioj en tiu urbo ne havis facilan taskon, ĉar lastmomente ili devis aranĝi multon, sed tamen, dank' al ilia energia laboro, la kongreso, kiun partoprenis proks. 160 personoj, bone sukcesis. Detalan raporton ni publikigis en N.E. de junio 1952.

Nederlanda Esperantisto: Dank' al la harmonia kunlaboro kun Flandra Ligo Esperantista ankaŭ en 1952 nia organo povis aperi en la jam tradicia formato. En 1951 okazis enketo pri la enhavo, por sondi la opiniojn de la legantoj, sed nur malmultaj nederlandanoj reagis al tiu enketo. Kvankam la redaktoroj kompreneble neniam povas kontentigi ĉies preferojn, estas tamen dezirinde, ke ili estu informitaj pri la opinio kaj la gusto de la legantaro, por kiel eble plej multe kalkuli kun ili. Pro troa laboro la ĉefredaktoro s-ro A. J. Kalma devis en junio 1952 demeti sian funkcion. Anstataŭis lin s-ro F. Roose el Brugge dum kelkaj monatoj; poste s-ro T. van Gindertaelen definitive transprenis lian taskon. Redaktoro por Nederlando fariĝis s-ro F. Weeke. Plurfoje nia organo en 1952 ricevis favorajn kritikojn en eksterlandaj periodaĵoj. La fakto, ke la nombro da abonantoj kreskis, pruvas, ke ankaŭ ne-anoj de L.E.E.N. aprezas nian organon.

(daŭrigota).

Respondo al Dro Manders

En la granda katolika gazeto „De Volkskrant" de la 30-a de Aŭgusto '52 aperis artikolo de D-ro W. J. A. Manders sub la titolo „La interesiĝo pri Esperanto en Nederlando malkreskas", kun subtitolo „Artefarita komunikilo tamen faras ankoraŭ bonajn servojn". La nederlandlingva eldonaĵo de la Oficejo „Esperanto en la Instruado", „De Esperantist", publikigis ĝin en mallongigita formo en sia numero 4, 1952. Nur la lastan mi legis; ĝi enhavis sufiĉe da esence gravaj eldiroj flanke de eminenta esperantisto ke ŝajnas al mi nepre utile, pli detale esplori ilin. La artikolo estis verkita en la nederlanda lingvo. Tamen, mi preferas reagi al ĝi en Esperanto, ĉar tiu ĉi reago estas destinita antaŭ ĉio por esperantistaj okuloj kaj cerboj.

1. **La negativa titolo:**

Verŝajne la aŭtoro deziris apelacii al la racio de siaj legantoj, kiuj bonvolu objektive prijuĝi la evoluon de la Esperanto-movado malgraŭ negativaj informoj. Sed, se oni konsideras, ke granda parto de la gazetleganta publiko legas nur la titolojn de la artikoloj, ke granda parto de tiuj, kiuj komencas legi, finlegas ĝin nur, se la unuaj alineoj kaptis ilin, oni devas konstati, ke laŭ vidpunkto de disvastigo kaj respektigo de la Internacia lingvo, estas psikologia eraro, publikigi artikolon kun kiel negativaj titolo kaj komenco. Des pli, se la sekvanta klarigado de la negativaj faktoroj ne estas tiel konvinka kaj logika, ke ĝi povas esti senhezite akceptata de indiferentuloj kaj kontraŭuloj.

Finlegis ĝin sendube la esperantistoj, sed ili povis ĉerpe malmultan kuraĝigon aŭ instigon el al tuto. Finlegis ĝin sendube ankaŭ la konvinkitaj kontraŭuloj de Esperanto, kiuj danke elprenos kaj larĝe utiligos ĉiujn detalajn informojn kaj ciferojn pri malkresko, zorge ignorante la pli pozitivajn argumentojn.

La indiferenta amaso, kiu aŭ neniam aŭdis pri Esperanto, aŭ ĉiam opiniis, ke ĝi estas senvalorajo, memoros la negativan komencon, estos kontenta pri sia evidente ĝusta opinio enprofundiĝos en la ceteron.

2. **La argumentoj:**

La artikolo mencias ankaŭ kelkajn pozitivajn faktojn: publikigojn de sciencistoj, radio-elsendojn, instruadon en seminarioj k.t.p., sed nur tre supraĵe kaj plene en la ombro de la negativaĵoj.

Mencii negativajn faktojn por atingi pozitivan celon - mi nepre supozas, ke la aŭtoro tion celis - ĉiam estas riska, precipe se oni ne povas tuj sekvigi plej trafajn kontraŭargumentojn.

La aŭtoro provas klarigi la fenomenon de malkresko en Nederlando per kaŭzoj internacie ekzistantaj - se ili ekzistas. Se la kaŭzoj estas, ke Esperanto preskaŭ perdis sian idean bazon, ke post pruvita praktika uzebleco la utilistoj deziras nur profiti ĝin, sed ne emas partopreni en la movado, tiuj faktoroj ekzistas ne nur en Nederlando, sed ĉie. Ili ekzistas ankaŭ en Germanujo, Skandinavio kaj Japanujo, pri kiuj landoj la aŭtoro iom poste diras, ke tie la interesiĝo gravege kreskas... Estas evidente, ke la nederlanda fenomeno havas aliajn kaŭzojn, sed alia klarigo ne estas donita. Sekve, la leganto ne estas konvinkita kaj la malbona impreso de la komenco restas.

3. **La artefariteco:**

En la mallongigita artikolo troviĝas ankoraŭ naŭfoje la esprimo „Kunsttaal" aŭ „Kunstmatige taal", per kio ĝi enmartelas la-ne-ekzistantan - argumenton de artefariteco en la kapon de siaj legantoj.

Ankaŭ tiun ĉi preferatan argumenton la malamikoj de Esperanto danke akceptos. Fakto estas, tamen, ke en la momento de sia naskiĝo Esperanto ricevis de Zamenhof la nomon „Internacia Lingvo". Estas la esperantistoj mem, kiuj poste malservis ĝin, maljuste kaj malĝuste donante al ĝi epiteton sugestantan malplivalorecon.

Zamenhof ne arbitre elpensis ian kodon, kiaj estas centoj da aliaj projektoj, kiuj ĉiam restis kodoj. Li ordigis la internacian lingvo-materialon, kiu jam ekzistis kaj vivis en la grandaj naciaj lingvoj, donante al ĝi genian gramatikon, same artefaritan aŭ neartefaritan kiel ĉiu alia gramatiko (Vidu la verkon „Retoriko" de Prof. I. Lapenna, ĉap. III kaj IV, precipe paĝojn 38—40 kaj 49—52, kun piednoto 55, kie estas menciitaj studoj de lingvistoj Marr kaj Müller).

La plua evoluo de Esperanto montris, ke ĝi efektive estas la internacia lingvo, la sola vivipova kiun povis naski la grandaj literaturaj lingvoj, kiuj donis al ĝi tiel efektivan vivoforton, ke ĝi kreskis al plenvivanta vivŝprucanta kultura lingvo. La evoluo de la lingvo estas merito ne ĉefe de la fanatismo de la unuaj pioniroj, sed estas merito ĉefe de ĝiaj propraj kvalitoj kaj denaska vivoforto. Ankaŭ aliaj projektoj iam havis fervoregajn, ĉiujn rimedojn uzantajn batalantojn. Tamen tiuj neniam sukcesis vivigi sian-fakte artefaritan- mortnaskitan kodon.

Diras Reto Rossetti en sia antaŭparolo al la supremenciita verko: „La Lingvo Internacia estas moderna socia fenomeno, produkto de la historio (kies instrumento tiucela estis Ludoviko Zamenhof)". Kaj plue: „Estas jam tempo, ke ni likvidu la kimeron, ke Esperanto estas „lingvo artefarita", eĉ „unu el la artefaritaj lingvoj" ..... Ni ne mistaksu nian lingvon: ĝi estas... plenviva instrumento de la homgrupo, kiu ĝin uzas..."

Vere, finfine ni likvidu la kimeron!

4. **La literaturo:**

Kvankam la aŭtoro mencias la ampleksan Esperanto-literaturon, li opinias, „ke la esperantistoj pli bone servus sian propran aferon, se ili pli koncentriĝus al la fakta celo de artefarita lingvo. Tiu celo certe ne estas kreado aŭ reproduktado de artaj verkoj. Kiu deziras okupiĝi pri literaturo, provizore ankoraŭ povas fari tion tre bone sen Esperanto". (Poste la aŭtoro kontraŭdiras sin mem, kiam li mencias,ke multaj laboristoj nur pere de Esperanto konatiĝis kun la literaturo kaj nacia kaj internacia, ke la lingvo malfermis al ili vojojn antaŭe alireblajn nur por intelektuloj ktp.)

La esperantistoj formas homgrupon uzantan vivantan lingvon, la internacian, same kiel ĉiu alia aro da individuoj, uzanta komunan lingvon, formas tian homgrupon. Ĉiu individuo en la homgrupo uzas la lingvon laŭ sia maniero, laŭ sia karaktero, laŭ sia talento. Fripono uzas ĝin por trompi; literaturisto uzas ĝin por krei aŭ reprodukti verkojn, kaj ne por kunmeti turismajn faldfoliojn. Certe, ankaŭ por la faldfolioj kaj aliaj praktikaj celoj troviĝas kompetentuloj en la homgrupo. Sed, dank' al multaj talentaj literaturistoj kreiĝis kaj daŭre kreiĝadas riĉega literaturo kun brilaj kaj plej altvaloraj juveloj de naciaj literaturoj apud elstaraj originalaj verkoj; literaturo de pli ol 28.000 publikaĵoj, literaturo, havanta netakseblan perantan funkcion, diskonigante en la mondon precipe literaturajn trezorojn de malgrandaj nacioj (Vidu dok. CED. D I kaj D II,I kaj CED/3, ĉap. 5).

Mistaksi la Esperanto-literaturon aŭ - pli grave - sugesti mistakson de ĝia grava rolo kaj alta valoro, signifas malbonan ateston ne por la Esperanto-literaturo, sed por la mistaksanto.

La literaturo estas plej efektiva esprimilo de vivanta lingvo. Se Esperanto iam estos oficiala akceptita, tio okazos ne nur ĉar ĝi montriĝis taŭga kaj praktika komunikilo sed, ĉar ĝi montriĝis vivanta internacia lingvo, funkcianta sur ĉiuj vivokampoj, kaj kiel praktika komunikilo kaj kiel literatura lingvo.

5. **La laborista movado:**

Amata ĉevaleto de indiferentuloj kaj kontraŭuloj - precipe intelektuloj - estas ankaŭ la argumento ke Esperanto estas bona kaj utila nur aŭ precipe por laboristoj. Ankaŭ tiun opinion la aŭtoro bone firmigas, rimarkigante „ke ne estas hazardo, ke la laborista movado en Nederlando estas pli forta ol ĉiuj aliaj kune; ke la laboristoj danke akceptis la eblecojn, kiujn malfermis por ili Esperanto; ke, nome, ili korespondas, faras eksterlandajn vojaĝojn, partoprenas internaciajn kongresojn kaj konatiĝas kun la literaturo." Denove, se tiuj argumentoj validas, ili validas internacie kaj ne nur en Nederlando.

Fakto estas, ke en Nederlando kaj kelkaj aliaj landoj la laborista movado estas pli granda ol la ĝenerala, sed fakto estas ankaŭ, ke en pluraj aliaj landoj ĝi estas multe malpli granda aŭ eĉ tute ne ekzistas, dum en internacia kadro la laborista movado certe ne estas pli granda ol la ĝenerala. Pruvo, ke Esperanto malfermas eblecojn ne ĉefe al laboristoj. La suprenomitan kvaropon da eblecoj Esperanto malfermas al ĉiu ajn homo de ĉiu ajn socia tavolo en ĉiu ajn lando, kun escepto de malmultaj privilegiuloj.

Sed la laboristaj movado en kelkaj landoj estas tre forta, en aliaj malpli forta, havas tute alian kaŭzon, nome, ke ĝi havas politikan karakteron. Tute prave, kompreneble, en la socia vivo de la homgrupo kiun formas la esperantistoj, la politikemuloj uzas la lingvon por siaj celoj, tute same kiel ekz. la religiemuloj uzas ĝin por la siaj.

Estas evidente, ke ĉiuj kvin suprenomitaj punktoj el la artikolo de D-ro Manders ne nur enhavas maljustaĵojn koncerne la Internacian lingvon, ne nur ne donas ĝustan dokumentitan materialon pri Esperanto, sed krome prezentas surplete ĉiujn centfoje ripetitajn kaj centfoje refutitajn amatajn ĉevaletojn al la malamikoj de Esperanto.

Ĉu oni povas atendi utilon de publikigo de tia artikolo, precipe en la nuna stadio de la movado, kiam la estimo kaj respekto de oficialaj flankoj al la Internacia lingvo pli kaj pli kreskas dank'al grandegaj strečoj de la instancoj de la movado kaj malgraŭ la negativismo de multaj ĝiaj adeptoj, pri tio konkludi mi volonte lasas al la legantoj.

M. H. VERMAAS.